V-0891


# ESPERANTO-SERVO

AKTUALA INFORMA BULTENO DE PRAHA

Jaro 4. Nro 7 — 15-VII-1951




*Ĉs. familio subskribas la postulon pri la Pakto de Paco.*

# 9,020.522

## CIVITANOJ DE ĈEĤOSLOVAKIO SUBSRIBIS LA POSTULON PRI LA PAKTO DE PACO

De la 26a de majo ĝis la 17a de junio okazis en Ĉeĥoslovakio popola voĉdonado por la efektivigo de packontrakto inter la kvin grandpotencoj, kaj la voĉdonado estis ligita ankaŭ kun la protesto kontraŭ la rearmado de okcidenta Germanio kaj kontraŭ la agado de l' perfida reakcio. La popolan voĉdonadon partoprenis 9,081.421 civitanoj, t. e. 98,38% civitanoj kun aĝo ekde 15 jaroj, surbaze de la nacia popolsumigo en marto 1950. El tiu ĉi nombro jese voĉdonis kaj per sia subskribo respondis la tri donitajn demandojn entute 9,020.522 civitanoj, t. e. 99,33%. La voĉdonilon ne subskribis 60.899 civitanoj, t. e. 0,67%.

## POR PLI BONA MONDO

La unuaj centmiloj da ĉeĥoslovakaj civitanoj jam subskribis la voĉdonilojn en la popola voĉdonado pri paco.

Por la konservo de paco — kaj senpere por nia Respubliko — havas eksterordinaran gravecon la problemo de Okcidenta Germanio kaj ties rearmado fare de la usonaj imperiistoj. Okcidenta Germanio ludas en la planoj de la usonaj imperiistoj rolon speciale gravan. Tial nun en nia lando kaj en la tuta mondo voĉdonas milionoj da homoj por starigo de Pac-Kontrakto, sed ankaŭ kontraŭ la rearmado de Okcidenta Germanio.

Germanio kaj ties prusa militismo ludis dum jarcentoj de la eŭropa historio la plej reakcian rolon de sangverŝema ĝendarmo kontraŭ ĉia progresema movado ne nur en Germanio mem, sed en la tuta Eŭropo. La realigado de la konkeraj planoj de l'germanaj imperiistoj kaj militismanoj multfoje kovris la eŭropajn landojn per detruado kaj pereigado.

Post kiam Germanio en la unua mondmilito estis venkita, la okcidentaj — kaj precipe la usonaj — imperiistoj revivigis la germanan imperiismon. Ora riverego da dolaroj torentis al Germanio kaj helpis renovigi kaj redisvolvi ĝian militpotencialon. La germana imperiismo, man-en-mane kun la tutmonda, imperiismo igis elkreski Hitleron kaj la naziismon, por fleksi la obstinecon de la germana laborista klaso kaj por servi al la kapitalismo kiel batpugno kontraŭ Sovet-Unio. Kaj la munkenaĵo jam estis rezulto de la daŭraj provoj de l'okcidentaj imperiistoj pri akordiĝo kun Hitler. Dokumentoj pruvas la kulpon de la brita registaro, ke jam en novembro 1937, ĉe la vizito de Lordo Halifax en Germanio, malimplicite oferis Ĉeĥoslovakion kaj Aŭstrion al la akordiĝo kun Hitler.

La oferdono de Ĉeĥoslovakio kaj Aŭstrio fare de la okcidentaj imperiistoj estis la „honorario" prezentita al Hitler por tio, ke li entreprenos atakon kontraŭ Sovet-Unio.

La okcidentaj imperiistaj potencoj, batalante en la dua mondmilito kontraŭ la hitlera Germanio, kiun ili antaŭe estis ĉiarimede rearmantaj kaj subtenantaj kaj kun kiu ili ne interrompis profitigajn komercajn interrilatojn eĉ en la daŭro de la milito, ne batalis kontraŭ hitlerismo, sed kontraŭ konkurenculo, kiu volis superkreski siajn iamajn patronojn, — kiu tamen samtempe kaj antaŭ ĉio estis ilia espero en la malamikaj planoj kontraŭ Sovet-Unio. Samtempe ili jam en la daŭro de la milito, kiam estis jam evidente, ke ne sukcesos iliaj planoj pri detruo de Sovet-Unio, kaj ke Sovet-Unio atingos gloran venkon, ili interkonsiliĝis kun naziistaj grandindustriuloj kaj financmagnatoj pri postmilita rearmado de Germanio kaj pri la tria mondmilito, kiun ili komune entreprenus kontraŭ Sovet-Unio. Jam en la tempo de la lasta mondmilito la imperiistoj de Usono do komencis vesti la ĉifonhavan hitleran Germanion per malnovnova uniformo de ĝendarmo kaj atakemulo.

Sovet-Unio, kiu neniam deflankiĝis de konsekvence paca politiko, konsciis la grandan signifon de Germanio por la problemo de paco. Sovet-Unio ĉiam estis konvinkita pri tio, kion esprimis la letero de Ĉefgeneralo J. V. Stalin okaze de la fondiĝo de Germana Demokrata Respubliko en la jaro 1949a: *„Oni ne povas pridubi, ke la ekzisto de pacama demokrata Germanio kune kun la ekzisto de la pacama Sovet-Unio ekskluzivas la eblecon de novaj militoj en Eŭropo, ĉesigas la sangverŝadon en Eŭropo kaj malebligas la sklavigon de la eŭropaj landoj fare de la tutmondaj imperiistoj."* Ĝuste tial Sovet-Unio ankaŭ en la jaro 1945a okaze de la starigo de l'Konvencio de Postdam klopodis por akceptigi konsekvencajn sennaziismigon, demokratiigon kaj senmilitismigon de Germanio, detruon de ties militpotencialo, starigon de unueca, pacama Germanio, en kiu oni detruos la radikojn de imperiismo kaj militismo.

La okcidentaj potencoj, Usono, Anglujo kaj Francio, tiutempe ne povis elpaŝi kontraŭ la justaj postuloj kaj proponoj de Sovet-Unio kaj *subskribis la Konvencion de Postdam*. Ili faris tion, ĉar en la momento, kiam finiĝis la terura milito, kiam miloj da urboj estis ruinigitaj, kiam milionoj da homoj priploris siajn familianojn, kiam la tuta mondo ĝojegis pro la paco, en tiu momento ili ne povis elpaŝi kontraŭ la pacaj proponoj de Sovet-Unio kaj kontraŭstarigi al tiuj sian veran planon, la planon pri rearmado de Germanio, pri revivigo de la faŝismo kaj pri nova milito. Ili akceptis la Konvencion de Potsdam, por trompi la centmilionojn da homoj ĝojegantaj pro tio, ke venis la tago de paco.

La enhavo de la Konvencio de Potsdam estis la programo, kiel definitive detrui la plurcentjaran fonton de eŭropaj militoj.

## LA AFERO DE PACO EN ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO VENKIS, KAJ ĜI VENKOS EN LA TUTA MONDO

La Konvencio de Potsdam parolas pri sennaziismigo. La okcidentaj imperiistoj tamen liberlasas el karceroj eĉ la plej gravajn nazimilitkrimulojn kaj asistantojn de Hitler, atribuante al ili gravajn postenojn en la ŝtata, ekonomia kaj militista aparato. Rekte simbola estas la liberlaso de Krupp, unu el la plej grandaj armilfabrikistoj de l'mondo, kiu helpis Hitleron kaj akiris abundajn profitojn dank' al ties militiroj.

*En la okcidentgermanaj fabrikoj oni ne produktas por paco, sed por milito.* Man-en-mane kun la renovigado de l'armil-industrio, redonita al la iamaj posedantoj, sub financa partopreno de la usonaj armilfabrikistoj oni renovigas la germanan armeon. La „Oficejo de la Komisiito de l'Federacia Registaro por Enloĝigo de Aliancanaj Okupaciaj Armeoj" estas nenio alia ol maskita ministerio por milito, kie nun aktivas la iama ĉefo de la Rommel-stabo Speidel, la iama estro de la hitlera ĝenerala stabo Heusinger k. a. — La „Ekonomia Esplor-Instituto" en Godesberg estas nenio alia ol ĝenerala stabo, kiun estras la iama nazi-generalo Halder. La duonmiliono da t. n. „policanoj", provizitaj per malpezaj kaj pezaj armiloj kaj motorizitaj, estas nenio alia ol kerno de estonta armeo.

La usonaj imperiistoj kune kun siaj servantoj en Bonn stimulas en la germanoj transloĝigitaj el Ĉeĥoslovakio kaj Polio emon al revizio kaj revenĝo. Man-en-mane kun ili kunmarŝas ankaŭ nia perfidema elmigrintaro, kies reprezentantoj subskribis kun la ellandigitaj germanoj „konvencion" pri ripeto de la munkenaĵo, pri likvido de Ĉeĥoslovakio, pri abolicio de la ellandigo de l'germanoj.

La neplenumo de la Konvencio de Potsdam fare de la okcidentaj imperiistoj kaŭzas, ke *Okcidenta Germanio fariĝas unu el la plej danĝeraj fokusoj de nova milito.*

Sovet-Unio laŭvorte tutplenumis la Konvencion de Potsdam, kaj dank'al ĝia paca politiko povis elkreski Germana Demokrata Respubliko, kiu nun estas fidinda fortikaĵo de paco kaj brila ekzemplo ankaŭ por la germanoj en Okcidenta Germanio. En Germana Demokrata Respubliko samtempe montriĝis, ke la Konvencio de Potsdam estis ĝusta, ke ĝi estis konvencio, kies plenumo sekurigas la pacon.

En Germana Demokrata Respubliko la homoj konstruas feliĉan vivon en sia Kvinjar-Plano. Tiu ĉi parto de Germanio estis tute konsekvence sennaziismigita kaj senmilitismigita, la fabrikoj tie laboras por produkti pacajn varojn. La popolo de Germana Demokrata Respubliko senigis sin je grandindustriistoj kaj grandbienuloj, la kolonoj de l'imperiismo kaj militismo. Siajn aferojn regas nun ĝi mem. La popolo de tiu respubliko dediĉis ĉiurilatan zorgon al la transloĝigitoj, kiuj trovis tie novajn hejmojn kaj laboras entuziasme super la konstruado de sia patrolando. Germana Demokrata Respubliko agnoskas la transloĝigon kiel justan kaj malprovizoran, kaj agnoskas la landlimon Odro-Niso kiel definitivan.

La usonaj imperiistoj volus el Okcidenta Germanio fari deiran punkton de nova milito. Ĉeĥoslovakion atendus nova munkenaĵo kaj sklaveco ankoraŭ multe pli malbona ol dum la lasta mondmilito.

La situacio tamen tute funde ŝanĝiĝis. Sovet-Unio reprezentas hodiaŭ potencan, nevenkeblan forton. Ĉirkaŭas ĝin amikrilataj landoj de popol-demokratio. En la tuta mondo elkreskis demokratiaj fortoj, naskiĝis la giganta porpaca movado, senprecedenca en la historio. En Ĉeĥoslovakio mem ne ekzistas hodiaŭ fortoj, kiuj simile kiel en la tempo de la munkenaĵo forvendus la nacion. Eĉ en Germanio mem neniu deziras militon. En Okcidenta Germanio Adenauer, antaŭtimante la volon de la popolo kaj ties kontraŭmilitan proteston, malpermesis la voĉdonadon de la popolo kontraŭ la remilitismigo. Malgraŭ la teroro kaj la malpermesoj de lia marioneteca registaro la okcidentgermana popolo tamen brave manifestas sian rezistemon.

La ĉeĥoslovaka popolo bone rememoras la munkenaĵon kaj neniam forgesos la tragedion de Lidice kaj Ležáky, la dekmilojn da plej bonaj filoj kaj filinoj de sia nacio, kiuj fariĝis viktimoj de la nazi-murdistoj. La ĉeĥoslovaka popolo porbatalas la pacon per sia konstruado de socialismo, plenumante la taskojn de la Kvinjar-Plano. Per la subskriboj sur la porpacaj voĉdoniloj ĝi manifestas sian decidan volon konkeri la pacon, malebligi la rearmadon de Okcidenta Germanio. Ĉiu subskribo sur la voĉdonilo reprezentas la forton, kiu helpas frakasi la planojn de la usonaj posteuloj de Hitler, ĝi plifortigas la heroajn porpacajn batalantojn en la kapitalistaj ŝtatoj kaj alproksimigas la epokon de homa feliĉo, travivata en krea laboro kaj paco.

**MOBILIZU ĈIUJN FORTOJN AL PACO!**

## KLEMENT GOTTWALD TRI JAROJN PREZIDENTO DE ĈSR

Antaŭ tri jaroj, la 14an de junio 1948 la fidela filo de la ĉs. popolo estis elektita kiel prezidento de la respubliko. La evoluo dum la tri jaroj montris, kiom feliĉa estis la tago, kiam lin la popolo elektis al ofico de respublika prezidento, kiel la plej bonan filon de nia lando. Sub la gvido de Gottwald nia popolo ekmarŝis la vojon al rapida rekonstruo de nia lando, al plenumado de la kvin-jara plano de socialista konstruado de nia ŝtato, per kio efektiviĝas nia longtempa revo. La popolo de Ĉeĥoslovakio laboras por si mem. La rezultoj de la laboro ne fluas en la poŝojn de kapitalistoj de la malsociaj eksplutantoj, sed ili servas al la kresko de vivnivelo de nia popolo. Tial niaj laboristoj estas tiom dankemaj kaj tial ili multe amas sian prezidenton Klement Gottwald; ili fidas al li, ili ne forgesas, ke li devenas el ili. Sub lia gvido povis la etaj kaj mezaj kampistoj ekkomenci la historian ŝanĝon en la vivo de nia kamparo, krei ĝin kamparo socialista.

Niaj instruistoj, artistoj, kuracistoj kaj scienculoj, tial amas sian prezidenton Klement Gottwald, ĉar en la popoldemokratia Ĉeĥoslovakio estas plene malfermita la vojo por ĉia nia inteligentularo strebi en siaj fakoj al sukcesaj laborrezultoj, neniel minacataj per ekonomiaj krizoj kaj per senokupiteco. Fermita strateto de „burĝa" kulturo dum la estinta respubliko ne plu ĵetas ilin en marasmon, ne plu povas esti premitaj iliaj talentoj kaj kapableco. Kampistoj laboras sur siaj kampoj kuniĝintaj en kooperativoj, laboristoj laboras en siaj alnaciigitaj entreprenoj, inteligentularo sur siaj postenoj, kie ilia voĉo multe validas. Sub la gvido de Klement Gottwald unuiĝis fratece Ĉeĥoj kaj Slovakoj kaj neniu povos plu ilin denove disigi. Slovakio, la lando de ĝoja estonteco, ne plu vivos en mizero, kiel dum la burĝa, kapitalista Ĉeĥoslovakio. La popolo elektis vere bonan ŝipestron, kiu gvidas nian nacian kaj ŝtatan ŝipon al haveno de feliĉo, kiu gvidas nian ŝipon al socialismo kaj poste al komunismo.

La afero de la nacio, de la popolo estas en bonaj manoj. Frunte kun Klement Gottwald ni venkos ĉiujn barilojn. Sub la standardoj de Lenin kaj Stalin, sub la gvido de prezidento Klement Gottwald ni iros pli kuraĝe antaŭen al venko de socialismo, al venko de paco.

● Respublika prezidento donis amnestion dum monatoj aprilo kaj majo al 104 personoj. El tio li pardonis aŭ moderigis la karcerpunojn al 90 personoj. La sumo de pardonitaj punoj estas 72 jaroj kaj 2 monatoj. En unu kazo li ordonis abolicion de akuza pritraktado. Plue la respublika prezidento ordonis likvidi la postsekvojn de karcera puno al 13 personoj.



*ANTAŬEN AL LA III-aj MONDLUDOJ de Junularo kaj Studentoj-Pacbatantoj EN BERLINO DE 5-a ĜIS 19-a DE AŬGUSTO 1951.*

# 52-a FOIRO DE PRAGO

(20. majo—3. junio 1951.)

Alparolo de ĉefministro Antonín Zápotocký okaze de la malfermo de 52-a Foiro de Prago.

„Estimataj ĉeestantoj, kamaradoj kaj kamaradinoj!

Nunjara foiro de Prago, en sia vico jam la kvindek dua, montras ekzemplan bildon de tiu granda renverso, kiu paŝo post paŝo efektiviĝas ĉiam pli laŭplane kaj pli konsekvence en nia lando.

La foiro jam ne plu estas hazarda kungrupiĝo kaj kaosa amasigo de varoj kaj produktaĵoj, kiel ĝin antaŭ la okuloj de alrigardantoj prezentadis la estinta privatkapitalista produktado.

Nia produktado kaj komerco ne apogas sin hodiaŭ je hazardaj mendoj kaj komercaj kontraktoj de ŝanĝiĝanta klientlaro ĉu hejma ĉu eksterlanda.

Sur la hejma merkato ni planas ne nur la produktadon, sed ankaŭ la konsumadon. Konstante pli precize ni studas, kion ni produktu, por povi la bezonojn de hejma konsumanto kontentigi. Ni zorgas pri tio, ke la bezonoj de nia loĝantaro kresku kompare kun ĝia kreskanta vivnivelo. Per nia salajra politiko ni zorgas ankaŭ pri tio, ke proporcie kresku la aĉetforto ne nur de la malgranda kasto de homoj vivantaj en abundeco, sed prefere tiu de la vastaj tavoloj de la laborantaj. Tial nia produktado povas konstante pli kaj pli vaste disvolviĝi. Ni ne bezonas timi, ke venos trosaturiĝo de la merkato, ke venos malintereso pri varoj. Ne povas okazi, ke la loĝantaro ne povus aĉeti la varojn, da kiuj estas sufiĉe, kaj kiujn ili bezonus, sed pro malaltaj salajroj ne povus aĉeti.

Nia planita ekonomio absolute eliminas ekonomian krizon kaj bankroton de la aĉetpovo de vastaj tavoloj de la klientaro sur hejma merkato.

Alie statas la internacia merkato. Ĝia regula administrado, planado kaj reguligado estas pli malfacila tial, ke ĉi tie kelkfoje influas fortoj, kiujn ni per nia planado plene direkti ne povas.

Nia pli frua kapitalisma produktado estis orientita preskaŭ nur al la importo de krudaĵoj kaj eksporto de produktoj, precipe de ĉiutaga bezon-varo en la kapitalistajn ŝtatojn. Sekve de tio ĝi estis ne ŝirmita kontraŭ ĉiuj oscilado, kaosaj eventoj, spekulaciaj faroj kaj ekonomiaj frapoj del' kapitalista mondo, kiuj ofte kulminis en ekonomiaj krizoj kaj katastrofoj. Ili endanĝerigadis nian laborantan popolon per ebloj de neokupiteco kaj malsato. Tial la planata ekonomio kaj la konstruado de socialismo, per kiu ni celas daŭre sekurigi feliĉan estonton kaj bonfarton de la tuta laboranta popolo de tiu ĉi ŝtato, igis nin uzi alian direkton por nia eksterlanda komerco.

Tiu ĉi aliaorientiĝo estas videbla ankaŭ en nia Foiro. Ĝi klare karakterizas la kreskantan kontakton kun la socialista Sovet-Unio kaj kun landoj de popoldemokratioj, kies amasaj ekspozaĵoj de jaro al jaro fariĝas eminenta riĉigo de nia foiro kaj ankaŭ nunjare ili estas plimultigitaj je unu nova partoprenanto, kiu ludos en la estonteco certe gravan rolon en nia eksterlanda komerco. Ĝi estas vidinta kaj riĉa ekspozaĵo de Popola Respubliko Ĉinio.

Kiam do nia nunjara Foiro klare respeguligas niajn plivastiĝantajn interrilatojn kun landoj de planita ekonomio unuflanke, aliflanke estas videbla malaltiĝo de komercaj interrilatoj kun landoj de kapitalista okcidento. Estas nenia sekreto, ke kapitalistaj landoj, kies ekonomio kaj komerco troviĝas pli kaj pli en la kaptiteco de la diktado de l' amerikaj grandkapitalistoj, klopodis nin en la lastaj jaroj ekonomie diferencigi. Estis ĉefe tial, ke ni ne subiĝis al la diktado de la tiel nomata Marshall-plano kaj ke ni ne vendis por plado de necerta dolar-helpo la politikan liberecon kaj memstarecon de nia ekonomio al amerikaj perfortuloj.

La diferencigo celis endanĝerigi nian socialistan konstruadon, celis venigi bankroton de nia ekonomio, kondamni al stagnado kaj senokupiteco nian produktadon. La nuna Foiro donas klaran respondon al tiu ĉi klopodo de amerikaj militprovokistoj kaj heredantoj de hitleraj metodoj, subigi kaj okupi la tutan mondon. La klopodoj de amerikaj uzurpantoj maltrafas sian celon.

La Ĉeĥoslovaka produktado, komerco kaj ĝia tuta ekonomio de jaro al jaro kreskas kaj progresas en rapideco neniam pli frue konata.

La kvindekdua Foiro de Prago estas viva kaj klara bildo de nia samtempa vivo, granda manifestiĝo de ekonomia karaktero, brila ekspozicio de la sukcesoj de nia kvinjarplano. La foiro montras, kiel en la batalo por disvolvi nian ekonomion forĝiĝas la unueco de laboristaro, kampistaro kaj de la ceteraj laborantaj kaj kiel nia popolo sub prudenta kaj gardema gvido de Komunista Partio kaj ties prezidanto, respublika prezidento Klement Gottwald, masonas la fundamentojn de sia bonfarto kaj feliĉa estonteco. La foiro montras ankaŭ la konstante disvolviĝantan kun-laboron de Ĉeĥoslovakio kaj Sovet-Unio, la grandan helpon al nia ekonomio kaj plue montras la kunlaboron kaj konstante plifortiĝantajn interrilatojn kun landoj popoldemokratiaj, al kiuj en lasta tempo aliĝas ankaŭ demokrata Germanio kaj Popola Respubliko Ĉinio, kiu partoprenas la Foiron. La ĉefa bazo de la ĉs. ekspozaĵoj estas bildigi la sukcesojn de la kvinjarplano unuavice en la peza industrio kaj akcenti novajn pliobligitajn taskojn. Speciala atento estas dediĉata al ekspozaĵoj de agrikulturo, kiu estas bildo de l' vivo de nia nova vilaĝo, kiu formetas la penegon kaj unuiĝas en kampistaj unuecaj kooperativoj kaj ŝtataj bienoj dum helpo de ŝtataj maŝin-traktoraj stacioj, kaj celas al socialista grandproduktado, kio estas necesa kondiĉo de sukcesa konstruado de socialismo ĉe ni. La Foiro plue montras, kiel brak en brake kun la disvolvo de nia ekonomio floras ankaŭ nia kulturo, scienco kaj arto kaj kiel nia vivo fariĝas pli ĝoja kaj pli riĉa.

La Foiro ne estas seka revuo de diagramoj kaj mekanika amasiĝo de produktaĵoj. Ĝi estas plene ligita kun nia vivo. Ĉiuj produktaĵoj estas montrataj en ligiteco kun tiuj, kiuj ilin kreas-kun niaj impetlaboruloj, plibonigantoj, kooperativanoj, inĝenieroj, teknikistoj kaj scienculoj. La nunjara foiro de Prago intimigas nin kun la nova fakto, ke nia hodiaŭa planata kaj socialigita produktado likvidas konstante pli konvinkige la malnovan, de kapitalistoj kreitan legendon pri nesufiĉo de mineralaj riĉaĵoj kaj krudaĵmateria bazo de nia respubliko. Tiu ĉi legendo estis intence kreita por povi subteni la necesan dependecon de nia respubliko, por povi ĝin subigi al la aspiroj de kapitalista okcidento.

Pro tio la geologia esplorado kaj serĉado de mineraltrovejoj estis ĉe ni antaŭe fako tute neglektata. Hodiaŭ montriĝas, kiel grandan pekon kaj fakte krimon faris la kapitalistoj kontraŭ nia lando kaj ĝia laboranta popolo.

Estas denove la amika helpo de Sovetunio, de ĝiaj scienculoj kaj esploristoj, kiu helpas nin malkovradi la ĝis nun senfrukte kuŝantajn trezorojn de nia lando. Ilia trovo konstato kaj praktika utiligado donas al ni eblon evolui nian produktadon, provizi ĝin per krudmaterialoj — antaŭe multekoste aĉetataj — fari nian ŝtaton ĉiam pli libera, sendependa kaj memstara.

La arango de la nunjara Foiro estas penetrita per du fundamentaj ideoj: konstruado de socialismo kaj defendo de paco.

La Foiro montras, kiel ĉi tiuj fundamentaj ideoj estas nedivideble ligitaj reciproke kaj kiel ili fandiĝas en unu tuton. Sen elkonstruado de la socialismo ne ekzistas daŭra paco kaj ne ekzistas feliĉa estonteco por la laborantaj homoj. Sen trankvilo kaj paco, sen fiaskigo de la krimplanoj de la militprovokistoj, sen malebligo de iliaj insidoj kaj intrigoj ne estas ebla ia trankvila laboro, ne eblas liberigi la kreo-kapablojn de la plej vastaj popoltavoloj kaj kreskigi ilin ĝis ekstremo. Sen batalo por konservi la pacon ne estas eble sin doni al la espero pri feliĉa kaj ĝoja estonteco de la nuntempa kaj venonta generacioj.

Tiu ĉi klopodo konservi la pacon kaj realigi la socialismon en nia lando kondukas nin al ĉiam pli granda kaj ĉiam pli firma amikeco kun Unio de Sovetaj Socialistaj Respublikoj, kondukas nin al ĉiam pli vasta kaj pli firma alianco kun ĉiuj popoldemokrataj landoj, ĝi kreas novajn rilatoin al nia proksima najbaro, la Demokrata Respubliko Germana, vekas niajn ardajn simpatiojn por la heroa korea popolo batalanta kontraŭ la krima agresio de la imperiismaj invadintoj kaj murdantoj, vekas en ni fonton de la kredo, ke en la firma unueco kun la konstante kreskanta movado de la pacdefendantoj de la tuta mondo ni sukcesos defendi la pacon, ni fiaskigos la insidplanojn de la militprovokistoj, ni ankoraŭ pli vastigos kaj perfektigos nian produktadon kaj nian tutan ekonomion kaj ni sekurigos feliĉan estontecon por la popoloj de nia patrujo.

Sub tiu ĉi signo, en la nomo de nia prezidento Klement Gottwald, en la nomo de la registaro de la Nacia Fronto de la Respubliko Ĉeĥoslovaka, mi malfermas la kvindekduan specimenan Foiron de Prago kaj deklaras ĝin malfermita."

# INTERNACIA TAGO DE INFANOJ

La 1-a de junio estis internacia tago de infanoj. Ĉie en nia lando okazis paroladoj pri la signifo de tiu ĉi tago. En radiostacio Praha parolis okaze de tiu ĉi festotago de infanoj, la edzino de la respublika prezidento, Marta Gottwaldová, kiu diris interalie:

*„Pensante pri niaj infanoj kaj ilia estonteco ni des pli multe konsciiĝas pri la neceso defendi la pacon kontraŭ ĉiuj planoj de militprovokistoj, defendi infanojn kontraŭ ĉiuj teruroj de milito. Ni bezonas pacon, por ke niaj infanoj povu trankvile uzi ĉion, kion al ili donas nia popoldemokratia respubliko. Neniam en la pasinteco nia ŝtato zorgis tiom ofereme pri niaj infanoj, pri sociala asekuro kaj higieno kaj en lernejoj kaj en iliaj hejmoj. Kaj ĉefe, la gepatroj de niaj infanoj ne bezonas timi, ke ili perdos okupon, ke ili ne havos panon por siaj infanoj kaj por si mem. En Sovet-Unio, en popoldemokratiaj landoj vivas infanoj feliĉe kaj tio estas nur komenco. En paco daŭra ni des pli multe zorgos, ke ili havu ĉion, kion ili por sia evoluo bezonas. Ni en tiuj ĉi momentoj pensas ankaŭ pri la infanoj en Koreio, kie iliaj korpetoj estas krime disŝirataj per amerikaj bomboj, ĵetataj de amerikaj aviadistoj kaj de iliaj satelitoj. Tiuj ĉi mortigitaj kaj kripligitaj infanoj el Koreio vokas al ĉiuj patrinoj, al ĉiuj homoj en la mondo: Ĉesigu la militon, batalu por la paco inter la nacioj! Kaj kion diras hodiaŭ al ni vizaĝoj de niaj infanoj? Patrino, patro voĉdonu por paco, voĉdonu por la Pakto de Paco, voĉdonu por mia vivo, por mia feliĉo. Estu en la mondo eĉ ne unu patro kaj patrino, kiu la deziron de siaj infanoj ne obeus. Jes, subskribu kaj vi defendos vian propran feliĉon!*

# LETERO DE D-ro HEWLETT JOHNSON AL REDAKCIO DE „RUDÉ PRÁVO" („RUĜA RAJTO")

Dro Hewlett Johnson, dekano en la angla urbo Canterbury, estas unu el la unuarangaj porbatalantoj de la tutmonda paco kaj amikeco inter la nacioj. Por siaj meritoj li ricevis la internacian Stalin-premion „Por Plifirmigo de la Interpopola Paco". D-ro Hewlett Johnson sendis al la redakcio de „Rudé právo", kiu estis turninta sin al li, la jenan leteron:

*„Kiam mi rememoras la tendaron en Oświęcim, la fabrikon de sapo el homaj korpoj en Gdynia kaj la ekstermitan Lidice, kiel mi vidis ĝin en la jaro 1945a, plenigas min per teruro tio, ke la okcidenta mondo povus toleri la penson pri renovigo de la potenco de l'nazi-generaloj, kiuj devas plene respondeci pri sia partopreno en tiu ĉi nigra paĝo de la tuthomara historio.*

*La renovigo de la potenco de l'naziuloj, la reaktivigo de Krupp kaj de la ceteraj germanaj industriistoj, kiuj portas ankoraŭ pli grandan respondecon, signifas perfidon al ĉio, kion ni antaŭ kvin jaroj porbatalis, ĝi signifas perfidon al la viroj, kiuj tiom brave oferis siajn vivojn por rompi la naziulan potencon, ĝi signifas rompon de la konvencioj atingitaj en Teherano, Jalta kaj Potsdam, kvazaŭ ili estus nuraj ĉifonoj. Ĝi signifas rektan minacon pri tria mondmilito, kiu alportus teruran katastrofon al la tuta Okcidenta Eŭropo kaj — ne lastavice — al mia propra lando, kiu nun estas aviada bazo por atombombardiloj.*

*Tamen ne estas ankoraŭ malfrue por tio, ke la konscienco kaj volo de la pacama mondo akceptigu sian voĉon. La sama unueca voĉo jam atingis sukceson, kiam ĝi protestis kontraŭ la apliko de atombombo en Koreio.*

*Oni ne povas dubi, ke amasoj de la germana popolo aliĝus al ni — se ili povus libere esprimi siajn pensojn — en la porpaca batalo kaj kondamnus tiujn, kiuj volas devigi ilin, ke ili prenu armilojn kaj denove kontraŭstaru la grandajn fortojn, kiuj nur antaŭ nelonge helpis liberigi Eŭropon.*

*Koroj de milionoj da homoj en mia propra lando aliĝas al vi, kondamnante la militpolitikon de Usono, kiu minacas rompi la tutmondan pacon kaj senbridigi militterurajojn.*

*Venku la paco kaj la pripaca intertraktado! Mi salutas ĉiujn adeptojn de la paco en Ĉeĥoslovakio!*

*Hewlett Johnson p.-m."*

# MILIONOJ DA SOVETIAJ VIZITANTOJ PARTOPRENIS LA FESTIVALON DE ĈS. FILMOJ

Ĉeĥoslovaka filmarto rikoltis grandan honorigon: en Moskvo kaj en pluaj dekunu grandaj urboj de Sovet-unio okazis de la 7a ĝis 15a de majo la Festivalo de ĉs. filmoproduktado. Ni estas fieraj (diras la deputito Jiří Hendrych, el ĈSR), ke ni povis partopreni tiun ĉi festivalon kaj renkontiĝi kun sovetiaj homoj, kiuj venis por vidi niajn filmojn. Nia delegacio vizitis filmoprezentadon en kvin grandaj kluboj de Moskvo kaj ĝi partoprenis ankaŭ la Filmfestivalon de ĉs. filmoj en Leningrad, Kijev kaj Stalingrad. Ni estas entuziasmigitaj per ĉio, kion ni vidis kaj travivis en tiuj ĉi kelkaj tagoj. Ĉie ni trafis grandan intereson pri nia lando kaj pri nia arto. Sur ĉiu paŝo akompanis nin amikeco kaj amo de sovetiaj civitanoj, amikeco kaj amo al nia patrujo kaj al nia nacio. En Moskvo vidis niajn filmojn pli ol unu miliono da vizitantoj kaj pluraj milionoj da filmantoj vidis niajn filmojn en la ceteraj plejgrandaj urboj de Sovet-unio. La ĉefurbo de Sovet-unio vere vivis sub la impreso de la Festivalo. Ĉie oni parolis pri la Festivalo, la grandaj afiŝtabuloj, ĉs. flagoj kaj Festival-afiŝoj. Dum niaj interparoloj ni ofte trafis sovetiajn civitanojn, kiuj en majo 1945 kun la armilo en mane liberigis nian patrujon. Ni ekkonis, kiel profunda kaj verma estas la amikeco de ĉiuj sovetiaj civitanoj al nia lando. En tia amika atmosfero okazis la nia Filmfestivalo. La ĉs. filmproduktado prezentis tie la plej novajn filmojn de sia produktado. Estis prezentitaj kolorigitaj filmoj: „Temno" (Vivo Senluma), „Král Lávra" (La reĝo Lavra), „Princ Bajaja" (La Princo Bajaja), plue nigraj filmoj: „Vstanou noví bojovníci" (Leviĝos novaj batalantoj), „Boj sa skončí zajtra" (La batalo finiĝos morgaŭ), „Bylo to v máji", (Ĝi estis en majo), „Posel úsvitu" (Heroldo de tagiĝo), „Za život radostný" (Por vivo ĝojoplena) kaj aliaj. Por ni, la filmfestivalo estis samtempe bazo, sur kiu ni povis prijuĝi kun helpo de niaj bonaj amikoj — sovetiajmajstroj de filmarto — la eminentan kvaliton kaj la mankon de nia filmproduktado. En tio estas la granda, tre signifa rezulto de la Filmfestivalo, kiu helpos al ni plue kaj pli sukcese disvolvi nian socialistajn kinematografion. Temas pri tio, ke ni kun pli granda klopodo laboru pri la dramatika bildo de nia nova riĉhava vivo kaj ke ni dum la produktado pensu ĉiam je tio, ke ni kunkonstruas la tutan grandan familion de pacamaj nacioj. Por la ĉs. ŝtata filmproduktado kaj ĝiaj laborantoj signifas la festivalo unu el la plej signifaj okazintaĵoj dum la tuta periodo de ĝia ekzistado.



*En la ekonomia strebado de ĈSR, celanta al socialismo, gravan rolon ludas sperta fakulo kaj ministro por financoj Jaroslav Kabeš, kiu devenas el Tábor, el regiono de glora husana tradicio. La ministro la 18an de junio 1951 festis sian 55an naskiĝtagon, kaj ĉe tiu okazo ni ĉiuj al li elkore gratulas, por lia bona kaj fidela servo, dum la konstruado de socialismo en nia lando.*

# NI NE POVAS RESTI INDIFERENTAJ

Jam longe mi ne travivis vesperon tiel teruran, kiel kiam mi el la radioaparato aŭdis pri la ekzekuto de la senkulpa negro McGee, pri la ekzekuto plenumita laŭ ordono de S-ro Truman. Ankoraŭ antaŭ nelonge, kiam ni en „Rudé právo" (= „Ruĝa rajto") legis la leteron de liaj kvar senkulpaj infanoj, vokantaj kompaton, ni esperis, ke S-ro Truman tamen sentos iom da homeca kompato kaj ne permesos okazigi tiun ĉi murdon. Certe eĉ ne unu patrino, leginta la leteron, restis indiferenta al la doloro de la senkulpaj negraj infanoj. Kvazaŭ iliaj voĉoj estus ĝisatingintaj niajn orelojn: *„Ne lasu morti nian paĉjon, li estas ja senkulpa, kaj ni amas lin kaj bezonas lin."* Eĉ ŝtono eble eksentus kompaton, sed ne S-ro Truman.

Ĉu entute ekzitas en la homa vortaro esprimo por la abomena ago? Ni ĉiuj, kiuj travivis la duan mondmiliton, ankoraŭ memoras la pasintecon plenan de teruro kaj malespera ploro. Certe eĉ unu virino ne forgesos la doloron de la patrinoj kaj infanoj, torturataj de la plej malbona malamiko de libereco kaj homa digno. Certe neniu patrino forgesos la viktimojn de la rasismo kaj la senkulpajn infanojn, kies vivo finiĝis en la gaskameroj de koncentrejoj, en la plej perversaj inventaĵoj de homoj nomantaj sin mem „disvastigantoj de la kulturo".

Ĉion ĉi neniu virino povas nek rajtas forgesi, kaj tial ankaŭ neniu virino ĉie ajn en la mondo povas resti indiferenta kaj sen intereso pri solvado de problemoj tiel gravaj, al kiuj apartenas la sekurigo de la paco por ĉiuj nacioj kaj de ĝoja estonteco por infanoj. Kaj la usonaj imperiistoj per sia aspiro al milito, per siaj kruelaĵoj, kiujn ili praktikas kontraŭ la senkulpa popolo korea, per sia tuta murdista politiko ankoraŭ multe superas la naziulojn. *Estas la tasko de ni virinoj, ke ni asociiĝu en unu granda nedetruebla fronto de paco.*

Mi klopodos por konvinki ĉiujn virinojn, ke ili aliĝu al la granda konstrua strebado de nia popolo. Per ĉi tiu konstrua strebado ni preparos al niaj infanoj pli bonan vivon, ol kian havis ni mem kaj niaj patroj. Nia popol-demokratia registaro donas al ni ĉiujn eblojn kaj premisojn por tio, ke ni vivu feliĉe kaj ĝoje. Ni montros al la usonaj imperiistoj, ke la ĉeĥoslovakaj virinoj estas progresemaj kaj celkonsciaj kaj ke ili fieras pri tio, ke ili apartenas al la granda tendaro de homoj konstruantaj socialismon kaj ke ili fiere sentas sian apartenecon al la granda kolektivo da homoj kiuj kontraŭbatalis kaj ĉiam kontraŭbatalos ĉion, kio en la homaro estas malbona.

Ni devas labori kaj vivi tiel, ke la devizoj „Konstruu la patrolandon — vi plifirmigos la pacon" fariĝu devizoj de ĉiu progresema virino. *Inter ni virinoj rajtas troviĝi eĉ ne unu, kiu ne apartenus al la porbatalantinoj de universala paco.*

Krista Holečková,
diplomita flegistino,
anino de Esperantista Klubo en Praha.

# LETERO AL LA LABORISTARO DE OKCIDENTO

Skribas Jos. Pojar, metallaboristo, Škoda-uzino, Plzeň

*„Miaj laboristaj amikoj kaj kamaradoj, mi skribas en viajn fabrikojn publikan amikan leteron laboristan. Ĝin mi skribas al vi el la popola kaj demokrata Ĉeĥoslovakio, el lando fama kaj konata jam pro la bataloj de la partianoj de Jan Hus en la 15-a jarcento. Mia letero estas skribata en Škoda-uzino, la iama armil-fabriko. Ĝin skribas mi, jam aĝa metallaboristo, laboranta en tiu entrepreno jam 40 jarojn. Ĉiam kaj senĉese, interna penso instigas min amike paroli kun vi — laboristoj de Okcidento — pri afero tre grava por la vivo de la tuta mondo, afero ĉiam urĝa, tio estas pri milito, aŭ paco. Ĉi tiujn liniojn mi skribas al vi en sincera amikeco, kredante, ke nia proletara forto en la tuta mondo, en ĉiu fabriko, estas tiel potenca, ke ĝi povas malebligi la militan sangverŝadon en Eŭropo.*

*Dum tiuj kvardek jaroj de metalista laboro en Škoda-uzino mi profunde konvinkiĝis ke estas terura vanteco fabriki armilojn en ia ajn formo. Mil- kaj milfoje ni interparolis inter laboristoj kaj teknikistoj pri la malŝpara kaj senbezona laborado kaj ŝvitado pro la diablaj militmaŝinoj kaj instrumentoj, kies fabrikado dum la kapitalismo kreskis senmezure.*

*El ĉio ĉi — danke la fratan Sovetunion kaj ĝian pacaman politikon — ni jam liberigis nin. Ni en Škoda vivas jam en laboro kaj fabrikado pacokreaj. Ni vivas kaj jam laboras libere, nove, pace. Ni fabrikas pacotempajn, utilajn maŝinojn por la vivo de nia nacio kaj ŝtato. Oftege mi rememoras pri la perfida pasinteco dum la malnova monarkio Aŭstria, kaj same dum pasinta la dudekjara burĝa regado de la hieraŭa kapitalisma Ĉeĥoslovakio, kaj mi vidas kaj travivas ankaŭ la revolucie ŝanĝitan nuntempon.*

*Kia diferenco! Grandega diferenco de vivo kaj de laboro! Nuntempe nia popola registaro per siaj organoj instigas nin, ke ni laŭ ĉiu eblo laboru kaj batalu por la paco. Sed certe vi rekonos, ke en tiu ĉi glora historiepoko ne eblas vivi izolite. Pro tio mi direktas min al vi petante, ke ankaŭ vi konstante kaj senĉese, nelacigante, memoru en via vivo kaj laboro pri la neceso konservi la pacon en Eŭropo. Al vi, progresemaj laborestroj, inĝenieroj, al vi ĉiuj kune — estu via lingvo la franca, germana, itala aŭ angla — al vi mi parolas, firme esperante ke vi stariĝos kontraŭ la abomena armado, direktata kontraŭ la socialista mondo.*

*La internacia kapitalo estas tro malforta kontraŭ la pura nacia kaj socia konvinko de la laborantaj milionoj. Akceptu do miajn vortojn de amika peto kaj praktike defendu ĉie la mondpacon. Ne fabriku militarmilojn por la mizera panpeco, kiun la kapitalista ekonomia potenco bonvole al vi donas! Antaŭ ĉio pripensu ĝisfine la teruraĵon. Demandu vin mem, kontraŭ kiu estas fabrikataj de vi la tankoj, kanonoj, bomboj, pafaĵoj, bomb-avionoj. Priparolu tion ankaŭ trankvile en via hejmo, kun viaj familioj, kun la edzino, kun la infanoj, kiujn vi amas super ĉio ajn, kun viaj parencoj. Demandu ilin, ĉu, en la nuna granda kaj glora epoko realiganta la socialismon en la mondo, havas ian sencon fabriki militan morton. Demandu ilin, ĉu la milito estas amiko de la homaro aŭ malamiko! Kaj laŭ tio decidu agi. Ĉiu mano ĉe vi, en Okcidento, povas utili por la konservo de la paco en la mondo. Neniu povas komandi kaj sklavigi la manon, se ĝin direktos la homeco. La kapitalismo en sia konata fidrompemo kaj perfideco ne sekvas naciajn kaj patriotajn celojn. Pro la profito ĝi vendas armilojn al ĉiu, kiu ilin pagas. Multfoje ni konvinkiĝis, ke per kanonoj fabrikitaj en Krupp-uzinoj estis mortigataj la germanaj laboristoj kaj iliaj edzinoj. Misuzita maŝino kaj armilo estas ekzekut-hakiloj en la manoj de regantoj. Misuzi teknikan genion estas la plej granda perfido de la homa kulturo. Ĉu la armilo, pri kiu vi hodiaŭ laboras, ne mortigos morgaŭ vian familion? Ĉu ankaŭ via lando, via naskiĝo-lando, ne estos morgaŭ disbatita ankoraŭ pli multe nun pro tio, ke viaj pensoj estis indiferentaj dum via laboro?*

*Mil pensoj demandas kaj vokas pri ĝusta respondo. Pro tio mi skribas al vi, malproksimen, trans la limojn de mia lando. Tiuj ĉi linioj estas adresitaj al la metal- kaj aliaj laboristoj en Germanio en fabrikoj Krupp, samkiel al karaj laboristoj francaj en la fabrikoj Schneider-Creuzot, al metallaboristoj italaj en Milano, Torino, al la gloraj laboruloj de Barcelono kaj Madrido. Kontraŭ la krimula minaco de atommurdado ni metas altan kaj gloran ideon de pacokreado! Nia armilo fine venkos, ĉar ĝi estas vivodona. Ni helpadu do al la vivo, ĉiupaŝe, senĉese. Tiujn ĉi liniojn mi skribas al vi, karaj nekonatoj, al malproksimo en Okcidento el granda metal-fabriko. Ĉi tie ni jam fabrikas nur tion, kio servas al la vivo de la homo. Eksvingiĝis la mirakla vergeto de sociigo de nia laboro, en kiu ne plu estas mastroj kaj sklavoj, kaj jen: la vergeto eksvingiĝis kaj la neeblo fariĝas fakto. Ankaŭ ĉe vi la neeblo fariĝos fakto! Necesas nenion atendi kaj realigadi ĉion, kion ni bezonas por vivi, kio mankas al ni, kion efektivigi estas necesa por ĉiuj homoj. Lerni vivodone en la tutmonda universitato de la instruo de Lenin kaj Marx, kiu estas instruo de ĉiuj kaj por ĉiuj. Abomenajn perfidulojn senvualigadi, elpeladi el la tempo de la homeco sur sterkejon de la historio! Mortigi en ni mem la malgrandanimecon. Ne ekzistas potenco kiu venkus nin, ne ekzistas forto kiu jugus nin ... Ni venkos, se ni ĉiuj kune klopodos por tio!*

*Tia estas mia saluto kaj parolo al vi, laboristoj en Okcidento.“*

# EGALAJ CELOJ — EGALAJ PAROLOJ

*Adolf Hitler la 12an de septembro 1938:* Laŭ mia ordono okazis granda disvastigo kaj plifortigo de nia armeo kaj de niaj aerofortoj.

*Harry Truman la 8an de januaro 1951:* Kongreso devas ... pritrakti la liberigon de la financoj por la plifortigo de nia militpotenco.

*

*Adolf Hitler la 22an de junio 1941:* Regantoj de Moskvo konstante trudas al aliaj nacioj sian regadon.

*Harry Truman la 8an de januaro 1951:* Danĝero de konkero de mondregado flanke de Sovetunio minacas nian liberecon.

*

*Adolf Hitler la 22an de junio 1941:* Tasko de nia fronto de Glacia ĝis Nigra maro ne estas nur defendo de unuopaj landoj, sed sekurigo de Eŭropo kaj per tio savo de ĉiuj.

*Harry Truman la 8an de januaro 1951:* Defendo de Eŭropo estas la bazo por la tuta libera mondo, enkalkulite Usonon.

*

*Adolf Hitler la 19an de septembro 1939:* Ni decidis finmiliti tiun ĉi batalon tiel aŭ aliel. Ni havas unusolan deziron, ke la Plejpotenca Dio lumigu ceterajn naciojn.

*Harry Truman la 8an de januaro 1951:* Tiun ĉi vojon ni marŝos kun decido kaj ni deziras Dian gvidantecon por ni en ĉio, kion ni faras, por ke ni plenumu Dian volon.

*Pierre Debray:*

# TUTA MONDO BEZONAS PACON

*Tiu ĉi letero de katolika ĵurnalisto estas adresita al la prezidanto de amerika asocio de Kavaliroj de Kolombo, organizaĵo laŭnome kristana, sed en realeco nekristane servanta al la interesoj de instigantoj por novaj militoj.*

Se ĉiutage inter Seŭlo kaj Fenjano ne mortus tiom da koreaj infanoj, mi, granda sinjoro marveturisto, havus emon por ironio. Mi diris al vi jam kelkfoje: atentu, ke vi ne similu al la via moŝta antaŭulo, Kristoforo Kolombo, kiu volis naĝi al Hindujo, sed kiu aperis en Ameriko. Vi predikas necesecon de krucmilitista ekspedo kontraŭ la Soveta Unio kaj kontraŭ la komunismo. Al vi vere utilus, kiam vi rememorus vian grandan antaŭulon, Adolf Hitler.

Sed ironion ni lasu al la estontaj tagoj. Ni lasu ĝin ĝis la momento, kiam vi pro rido flaviĝos aŭ eble eĉ nigriĝos. Hodiaŭ mi ne havas emon por ĝi, hodiaŭ estas nur loko por kolero. En Koreio brulas domoj, kiujn ekbruligis viaj armeoj sendube pro tio, por ĝojigi la sangavidan koron de Ridgway, posteulo de MacArthur. Tio ĉi al vi ne sufiĉis. Via „kristana“ amo supozas, ke oni devas korekti ankoraŭ aliajn erarojn, ke oni devas liberigi la malnovajn naziistajn generalojn— murdistojn, kiuj — kompatinduloj, supozeble devis en la arestejo ankaŭ iom labori. Kaj ili ja en ilia vivo faris nur grandajn aferojn, ili nur renversis la mondon!

Mi naskiĝis kristano, sed mi ne posedas tiun vian kristanan amon, kiu kapablus renversi Eŭropon en ruinojn tiel, kiel vi tion faris kun Koreio. Mi kapablas eminente prezenti al mi, kaj la samon hodiaŭ kapablas al si imagi eĉ multaj Germanoj, kian liberecon vi alportus al Germanujo. Germanujo konas la valoron de sango kaj de larmoj, vi certe ne. La lasta milito kostis Amerikon 200.000 da mortuloj. Eŭropon ĝi kostis 30,000 000 da mortuloj, falintoj kaj turmentmortigitoj. Kio rilatas estontan militon, kiun vi tiel laŭte alvokas, tiu laŭ via supozo al Ameriko alportus neniajn difektojn. Sed Eŭropon ĝi certe frakasus.

Vi parolas pri tio, ke nin minacas Sovet-Unio. Sed en Francujo, eĉ en Germanujo vi hodiaŭ apenaŭ trovus homon, kiu ne scius pri la gigantaj konstruaĵoj de komunismo, pri tiuj belegaj loĝejoj, pri larĝegaj aŭtostradoj, pri verdaj parkoj, pri tiuj mamutgrandaj uzinoj, pri tiuj gajaj ludejoj de ridradiantaj kaj feliĉaj, sanaj infanoj. Tio ĉi ĉio minacas vian kapitalismon antaŭ ĉio ĉe via propra popolo. Cetere ĉiuj ĉi aferoj estas al vi bone konataj. Sed same kiel tion diris al mi antaŭ nelonge unu sinjoro, treege al vi simila, kiun mi renkontis en la plej kristana angulo de Svisujo: „Tio ĉio estas vero, sed oni devas krii ...“

Des pli malbone por vi! Vi certe permesos al mi, granda sinjoro marveturisto, ke mi memoru vin, ke via preso amas sensaciaĵojn. Ĉu estas nenia sensaciaĵo, kiam Sovet-Unio dank' al siaj gigantaj projektoj kaj dank' al laboremo de sia popolo, sindona al ideo de homa libereco, konstruas regnon de superfluo, kie ĉiu havos senpage tiom da pano, kiom li povos konsumi?

Sovet-Unio do marŝas survoje al tiu ĉi celo, dum la kapitalismo dronas en krizo. Popoloj ĝin vidas kaj des pli facile estos ilia ĉiutaga metoda pacobatalo, kiun ili entrudos al la kapitalistoj.

Estas absurda, vi diros, neniam la kapitalismo fartis pli bone. Mi akceptus tiun ĉi vian aserton kaj mi volonte ĝin kredus. Bonvolu al mi, mi petas vin, klarigi, kial vi predikas la krucmiliton, kial vi tiel volonte ekkomencus la militon, kia laŭ via opinio estas la unusola rimedo, per kiu estas ebla neniigi socialismon?

Vi parolas pri marksistaj filozofiaj kaj homaj herezaĵoj. Kaj tio, kion vi proponas, ĉu tio estas unuigebla kun la kristana kredo kaj kun postuloj de kredantaj homoj? Vi diras, ke vi estas katoliko. Eĉ mi estas katoliko. Sed la katoliko neniam devas perdi la kredon.

Religio de Kristo malpermesas la memmortigon kaj kolektivan memmortigon des pli severe ol ĉiun alian. Se plaĉas al vi, trankville vi mortigu vin mem. Nin lasu vivi en paco. En Eŭropo estas milmiloj da katolikoj, kiuj ne estas marksistoj, sed por la trankvilo de iliaj kristanaj hejmoj, ili postulas nenion alian ol ke plenumiĝu la pacalvoko, kiu el Stockholm kaj Varsovio atingis la tutan mondon.

Deklari militon al Sovet-Unio. Kiu do havus ion el tio? La honestaj homoj de la tuta mondo scias, ke Sovet-Unio deziras pacon. Kaj la pacon bezonas la tuta mondo. Ĉu ne estus pli saĝa diskuti kun Sovet-Unio, serĉi komunan bazon por estonteco?

Vi nur ne scias rigardi al la morgaŭo, rigardi en vizaĝon alie, ol kaŝitaj sub la viziero de nova milito. Milito estas via lasta espero. Ni povas al vi diri definitive, ke tiu espero estas tre erariga.

Laŭ viaj eldiroj kaj agoj ŝajnus, ke vi devas liberigi popolojn de eŭropa oriento. Ĉu al vi diras nenion la deklaro de polaj episkopoj, kiuj vizaĝvizaĝe al sia dezertigita lando levigas kuraĝe ilian voĉon por paco, kiun ili tiel volonte alportus al la konstruanta Polujo! Ĉu ne ĉajnas al vi, granda marveturisto, ke ĝi estus aroganteco voli esti pli katolika ol la polaj episkopoj?

Birdon laŭ plumaro, arbon laŭ fruktoj oni ekkonas. Viaj fruktoj estas amaraj, ili maldolĉiĝas en la buŝo. Via amerika kristaneco je mejloj estas malproksima de Kristo, sed ĝi frapante similas al tiu, kiun ĝis nelonge apostolis Adolf Hitler, via antaŭulo. Estas afero de via gusto. Ĉu vi volas lin sekvi. Por mi, eĉ por ĉiu honesta kredanto mi asertas vin, pri nia plej profunda malrespekto.

# LA FOIRO DE PRAGO FINIĜIS

Ĝin vizitis pli ol 1,400.000 vizitantoj el ĉiuj anguloj de nia respubliko.

Ĉiu el ili foriris el la Foiro kontente kaj fiere. La Foiro estis vera bildo de la kreskanta progreso kaj forto de nia lando, ĝi pruvis, ke ni jam atingis grandajn sukcesojn. Ĝi estis ankaŭ pruvo, kiel en Sovetunio riĉiĝas la vivo de la popolo, kiel en la landoj de popola demokratio kreskas forto kaj vera feliĉo de la popolo.

La plej granda atento de la vizitantaro koncentriĝis kompreneble je ekspozaĵoj niaj kaj sovetuniaj. Pri nia laboro ni povas esti fieraj sendispute. Montriĝis, ke ni scias produkti eĉ tiajn objektojn, koncerne kiujn ni antaŭe dependis de la eksterlandaj kapitalistoj. Kaj kiom da novaj varospecoj, kiuj jam aperis en la Foiro, ni enkondukas ankaŭ en nian merkaton! Ankaŭ montraĵoj de la produktado kaj de la sukcesoj de niaj Unuecaj Agrikulturaj Kooperativoj kontentigis la vizitantojn. Montriĝis, kiel ĝusta estas la vojo de niaj kooperativoj!

La soveta ekspozicio vekis admiron precipe pro sia alta teknika matureco kaj pro prefekteco de la maŝinoj, pro la perfekta kvalito kaj beleco. Kaj kompreneble ankaŭ pro tio, ke ĝi montris, kiel Sovetunio jam fariĝis absolute sendependa je la kapitalistaj ŝtatoj fabrikante ĉion, kion la konstruado de la komunismo kaj la bezonoj de la laboruloj postulas.

Aŭ la Ĉina Popola Respubliko, kaj aliaj landoj popoldemokrataj! Iliaj ekspozicioj montris, ke tio, pri kio neniam iu iam ajn aŭdis, estas tie nuntempe fabrikata tute flue. Ekzemple produktoj de la peza industrio, pezaj instalaĵoj de elektrocentrejoj kaj simile.

Simple, nia Foiro kontentigis nin ĉiurilate. Montriĝis, ke ni iras la ĝustan vojon.

# SALUTO EL KOREIO

Komence de aprilo Ĉeĥoslovaka Asocio Junulara ricevis telegramon, kiun en Tutmonda Semajno de l' Junularo ekspedis la demokrata junularo korea kaj kiu tekstas jene:

„Okaze de Tutmonda Semajno de l' Junularo la Centra Komitato de Asocio de Korea Demokrata Junularo sendas al la heroa junularo de Ĉeĥoslovakio salutojn kaj dezirojn de plej bonaj sukcesoj ĉe la konstruado de socialismo sub gvido de la Komunista Partio kaj la saĝa gvidanto de l' ĉeĥoslovaka popolo Klement Gottwald.

Viaj sincera solidareco kaj subteno, kiun vi liveris al nia korea popolo, stimulos nian junularon al ankoraŭ pli energia batalo, por ke ni venku la krimajn agresantojn. Ni, la junularo de Koreio, certigas vin, ke ni batalos, ĝis ni definitive venkos la usonajn intervenantojn kaj ties helpantojn, por atingi sendependecon de nia patrujo, pacon kaj sekurecon en la tuta mondo.“



*La progresema germana direktanto Hermann Abendroth en Prago.*

# MUZIKO, UNUIGANTA LA NACIOJN EN LA BATALO POR PACO. PRAGA PRINTEMPO

La sesa Muzik-Festivalo Praga Printempo 1951 estis unu el la plej signifaj internaciaj muzik-okazaĵoj dum la lastaj jaroj. Partoprenis ĝin muzik-artistoj, komponistoj, muzik-scienculoj kaj kritikistoj el 17 landoj. La tuta festivalo okazis en la signo de batalo por paco, sub la devizo: „Por la muziko, kiu helpas unuigadi naciojn en la batalo por daŭra paco“. La devizo estis la esprimo por centmilionoj da progresemaj homoj sur la tuta mondo, voĉdonantaj por la Pakto de Paco inter grandaj potencoj, kontraŭ la rearmado de Okcidenta Germanio. La artistoj ne sole prezentis sian altkvalitan scion pri muziko, sed ili alportis paco-misiojn de siaj nacioj. La festivalon la unuan fojon partoprenis ankaŭ la delegacio de muzik-artistoj el popola Ĉinio. La delegacion gvidis komponisto Ma Su-cun kaj komponisto An-Po. Iliaj koncertoj montris kiel riĉaj horizontoj malfermiĝas al ĉina muzik-kulturo post la venko de ĉina laboranta popolo. Granda helpo de senhezita volo atingi la daŭran tutmondan pacon estis la partopreno de progresemaj muzik-artistoj el Germana demokrata respubliko, precipe la partopreno de la direktanto Hermann Abendroth, sub kies taktilo konvinke eksonis la misio de libera homo, esprimita en la IX. simfonio de L. v. Beethoven. La Printempo de Prago 1951 montris pli ol la pasintaj festivaloj, kiom multe progresis la linio de kreado en popoldemokratiaj ŝtatoj, montris, al kiaj neimageblaj ebloj gvidas la popolojn la liberigita homa laboro. Multaj koncertoj kaj alparoloj de eksterlandaj artistoj estis disaŭdigitaj de ĉs. radio-stacio kaj de eksterlandaj radiostacioj aŭ estis eternigitaj sur gramofon-diskoj, kion prizorgis la Nacia entrepreno de gramofonio. En la finan rondon de la dua internacia konkurso de fortepianistoj, kiuj strebis akiri la premion de Bedřich Smetana, enviciĝis fortepianistoj el Ĉeĥoslovakio, Sovet-Unio kaj Rumanujo. Denove akcentiĝis la gvida rolo de sovetaj artistoj, sed samtempe la sukceso de junaj ĉs. artistoj montris la egan krean progreson en landoj de popolaj demokratioj. La konkurso multe helpis al la scio pri fortepiana verkaro de Bedřich Smetana en la sfero de eksterlandaj muzik-lernejoj kaj helpis ankaŭ al ĉs. fortepianistoj ilian studon pri ĝusta kono kaj kompreno dum la reproduktado de la komponaĵoj de ĉeĥa klasikulo Smetana.

La festivalon partoprenis multnombra delegacio de sovetaj artistoj, gvidita de la duobla laŭreato de Stalin-premioj N. N. Krjukov, En la delegacio estis ankaŭ inter la aliaj la direktanto Nijazi el Baku, kantisto A. Ivanov, fortepianisto J. Zak kaj N. Jemeljanova, solo-kantistinoj L. Avdjejeva kaj V. Maksimova, junaj fortepianistoj G. B. Akselrod kaj M. N. Slesarjeva, virtuozo je balalajko P. Njeĉeporenko, popolaj kantistinoj fratinoj Fjodorov kaj multaj aliaj. Venis ankaŭ delegacio el Polujo, direktanto G. Fitelberg, prof. S. Szpinalski, trio de Wilkomirski kaj aliaj. El Bulgario venis artistoj, direktanto A. Margaritov, kantistino R. Miĥajlova, violonisto Bojan Leĉev. El Rumanio venis direktanto G. Georgesku, fortepianisto V. Georghiu, el Hungario venis inter la aliaj prof. I. Antal kaj kantisto M. Szákely. La festivalon partoprenis ankaŭ progresema franca komponisto Serge Nigg kaj multe da pluaj eminentaj artistoj el eksterlando.

Ankaŭ la tritaga internacia konferenco de komponistoj, muzik-scienculoj kaj kritikistoj, okazinta dum la festivalo el iniciato de la Asocio de ĉs. komponistoj kontribuis per riĉa materialo al la studado de samtempa muzika vivo en diversaj landoj. Dum

la konferenco tre gravajn referatojn prezentis reprezentantoj de progresemaj komponistoj kaj kritikistoj el kapitalistaj ŝtatoj: E. Rebling (Nederlando), O. Willumsen (Danujo), E. Aaltonen (Finnlando), dro M. Rubin (Aŭstrio), la muzikkritikisto de organo Unita d'Amico (Italujo) M. Rayment kaj A. Bowman (Granda Britujo), reprezentantoj de komponistaj asocioj el popola respubliko Ĉinio Ma Su-cun, el popoldemokratiaj landoj: V. Krstev (Bulgarujo), H. Jerea (Rumanujo), F. Szabó (Hungarujo), J. Jasienski (Polujo), kaj dro K. Laux el Germana demokrata respubliko. Tre iniciativaj estis la proponoj de la angla, aŭstria, pola kaj ĉs. reprezentantoj, kiuj tuŝis la sekurigon de plua daŭra kunlaboro de progresemaj muzik-artistoj sur bazo de komuna batalo por paco. Kun ampleksaj referatoj kontribuis al la konferenco dro A. Syhra kaj prof. V. Dobiáš (Ĉeĥoslovakio).

Nun post la finiĝo de Printempo de Prago flugos la alvoko de la festivalo en la mondon, kiu tekstas:

*„Kunligu viajn korojn kun la koroj de milionoj da honestaj homoj, kiuj ekleviĝis por la defendo de paco. Per sia verkaro artista strebu esprimi la plej ardajn dezirojn, fortigadu la popolon per siaj verkoj en la nuna batalo pri paco kaj instigu per sia arto pluajn anojn de la batalo pri vivo kaj feliĉo de la homaro. Tion vi faru jam pro tio, ĉar laŭ nia konvinko ĝi estas la unusola vojo, kiu savos por nia estonta generacio la grandiozajn trezorojn de muzika kulturo, kiun donis la longaj jarcentoj de l' homaro. Ĝi estas la unusola vojo, kiu povas sekurigi liberan evoluadon de muzika arto kaj ĝian ĝis nun neviditan, riĉan disfloriĝon. Fariĝu ankaŭ via propraĵo la ĉefa devizo de la Printempo de Prago 1951 „Por muziko, kiu helpas unuigi naciojn en la batalo al daŭra paco!“* Ĉiuj alviciĝu kun tiuj, kiuj elbatalos glorajn venkojn de libera homaro en la tutmonda batalo pri paco!

## POST LA NACIA ARTISTO hon. D-ro J. B. FOERSTER

La mortinta ĉeĥa komponisto Nacia Artisto hon. D-ro Josef Bohuslav Foerster vivis vere longe; preskaŭ naŭdek du jarojn dum kiujn fariĝis, unu el niaj plej grandaj majstroj, de nia tuta muziko. Ni konsideras, kiel intiman ligilon en la persono kaj verko de Foerster ni perdis kun la tempo kaj arto de la fondintoj de nia muziko nacia. Estinte posteulo de malnova muzikista familio de provincaj instruistoj, filo de la fama reformanto de eklezia muziko, kanthorestro ĉe S-ta Vito kaj profesoro ĉe l'orgenista lernejo Josef Foerster, estinte memoranto de Smetana, amiko de Dvořák kaj Fibich, li peris ĝis nia tempo ĉiujn plej bonajn tradiciojn de la ĉeĥa muzika pasinteco. La tradicia signifo de la komponista personeco de Foerster estas ties plej esenca trajto. La Smetana-dvořákan fundamenton Foerster pliriĉigis per novaj tonoj de individua karaktero. La optimisman serenecon kaj la elementan muzikecon de la du plej grandaj majstroj de la ĉeĥa muziko li refande transportis en mondon eksterproporcie pli delikatan, en sferon, kie la ĉefan vorton havas mola sentimento, liriko de reva subtileco. Tia estas la precipa tono de liaj tre multnombraj kantoj, pian-cikloj, ĉambraj kaj orkestraj komponaĵoj. Pluan karakterizan trajton de lia komponado oni trovas parte en la religi-tekstaj verkoj, parte en verkoj de medita karaktero, kia estas ekz. lia kulmina Kvara Simfonio. Kie tion la idea bazo de la verko postulis, tie por la esprimo de Foerster ne estis fremdaj eĉ tonoj de konvinkanta monumenteco, kion plej bone pruvas la jam menciita Kvara Simfonio kaj kelkaj horkantoj, precipe la grandastila Himno.

Kiun ajn sferon la verkado de Foerster tuŝis — kaj verdire ne ekzistas sfero, kiun ne tuŝus lia riĉa kreoforto —, kiel ajn delikata estis ĝia enhavo ĉiam distingigis ĝin firma interligiteco kun la tradiciaj valoroj de la ĉeĥa muziko. La malnova ĉeĥa orgenista familio kulminis en li per artista personeco de malofta krea amplekso; samtempe lia parolo ne ĉesis esti esprime simpla, senafekta, natura — jen kiel estas plenumitaj ĉiuj kondiĉoj, por ke liaj verkoj trovu vastan eĥon inter la publiko. Se oni kredas, ke kondiĉo por la plej alta honoro, kiun nia Ŝtato al la artisto donis per la honora titolo „Nacia Artisto“, estis la fakto, ke lia verko ankras efektive en la nacio, tiukaze ĉe Foerster la dirita kondiĉo estas plenumita en maniero plej bela. Sufiĉas konsciigi al si la gradon de plaĉo, kian ĉe nia publiko atingis la opero „Eva“, la komplika psikologia dramo, enkojnita en popola medio, kaj tamen prezentita de Foerster kun rava simpleco, sufiĉas konsciigi al si, kiel la tre multnombraj horkantoj de Foerster sukcese vetbatalas pri publika plaĉo kontraŭ la verkoj de Smetana kaj Křížkovský, por ke oni konfesu, ke Foerster plenmezure meritas la distingigan titolon, ke la titolo „Nacia Artisto“ estas ĉe li sole eksteraĵa konfirmo de la plej intima ligiteco, kia jam delonge ekzistis inter Foerster kaj la nacio. Ni rememorigu al ni okaze de lia morto, ke Foerster restis fidela al la tradicio de sia familio, kaj ke li per sia tuta verko estis servanta al sia popolo. Li restis fidela al la arto kaj al la nacio per sia tuta laboro, per laboro, kiun li ĝis la lasta horo ne ĉesigis.

Ĉi-rilate li certe estis brila ekzemplo de laboristo, kiu respondece plenumis la taskon al li komisiitan. Foerster, ŝatata, estimata kaj amata pro la alta artista kaj morala valoro de siaj verko kaj modela vivo mortis, sed en la koroj de nia popolo li vivos eterne.

● La entombigo de mortinta Nacia Artisto J. B. Foerster okazis marde la 12an de junio. La ĉerko de la komponisto estis vidigita al la popolo ĉiutage en la Nacia teatro, kien venis adiaŭi la amantoj de muziko.

## DISVOLVIĜO DE LA ALTLERNEJARO EN ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO

La unua altlernejo en nia lando estis la praga Universitato, fondita de Karlo la Kvara en la jaro 1348a kun la misio, ke la enloĝantoj de la Bohema lando, kiuj *„senĉese soifas la fruktojn de la scienco, ne bezonu eksterlande petserĉi helpon“*. Ekde tiam, nature precipe en la husana periodo, Karlo-Universitato ludis gravan rolon en la disvolviĝo de la nacia vivo, ne nur la kultura, sed ankaŭ la politika. La teknikaj altlernejoj estiĝis en nia lando nur en la 9a jarcento.

Post la naskiĝo de la memstara Ĉeĥoslovaka Respubliko elkreskis ĉe ni pluraj novaj altlernejoj de universitata kaj ankaŭ de teknika karaktero. Koncerne siajn enhavon kaj organizan formon ili tamen estis starigataj kiel instrumento de la reganta burĝa klaso. Ili estis edukantaj obeemajn servistojn de ĝia administra kaj ekonomia aparato kaj ideajn ŝirmantojn de la kapitalista sociordo. Ilia ĵus dirita funkcio estis kaŝata sub la vualo de aŭtonomeco, superpartieco, libereco de doktrino kaj objektiveco de la scienco.

La tempo de la okupacio estis por la ĉeĥaj altlernejoj tragedieca: jam la 17an de novembro 1939 oni fermis ilin; pluraj bonegaj instruistoj kaj studentoj falis en la batalo kontraŭ la okupaciantoj.

Nur la liberigo de Ĉeĥoslovakio fare de la Ruĝa Armeo ebligis post paŭzo preskaŭ sesjara remalfermon de la ĉeĥaj altlernejoj. Ilian reton oni ekde tiam sisteme plivastigas. Oni fondis novan universitaton, tiun de Palacký, en Olomouc, kaj starigis filiojn de Medicina Fakultato de Karlo-Universitato en Hradec Králové kaj Plzeň, estiĝis nova Politik- kaj Soci-Scienca Altlernejo en Prago, Sociala Altlernejo en Brno, nova Supera Lernejo Muzik-Arta en Prago kaj analoga Supera Lernejo de Janáček en Brno. La Minej-Sciencan Alternejon oni el Příbram translokis en la industrian urbon Ostrava, centron de minejregiono. Ĉe ĉiuj universitatoj oni starigis pedagogiajn fakultatojn, per kio realiĝis altlerneja klerigado de ĉiugrada instruistaro. En Slovakujo oni fondis Agronomi- kaj Forst-Inĝeniera Altlernejo en Košice.

La plifirmiĝo de la potenco de l' klaso laborista kaj la laborula popolo en Februaro 1948 signifas ekiĝon de nova konstrua periodo por niaj altlernejoj kaj ties pluan disvolviĝadon. Oni starigis filiojn de la pedagogiaj fakultatoj en Plzeň kaj en České Budějovice kaj novan Politik- kaj Ekonomi-Sciencan Altlernejon en Prago. En Slovakujo estiĝis filioj de pedagogiaj fakultatoj en Košice kaj Banská Bystrica, plue filio de Medicina Fakultato. Veterinara Altlernejo kaj Lignista Sekcio ĉe la Agronomi- kaj Forst-Inĝeniera Altlernejo en Košice, kiu urbo fariĝas dua multsignifa altlerneja centro de Slovakujo. Kaj en Bratislava ekfunkciis Bel-Arta Altlernejo kaj Altlernejo Muzik-Arta.

La granda ekprospero de la alternejaro en Ĉeĥoslovaka Respubliko ankaŭ dokumentas, ke la venko de la klaso laborista malfermas pordon al ĉiurilata disvolviĝo de la nacio kaj ke la popol-demokratio kaj socialismo ankaŭ en la sfero de la alternejoj, signifas kreiĝon de la plej bonaj kondiĉoj kaj premisoj por ties konstanta florado kaj por la sukceso de ilia laboro.

## KONVINKAJ AVANTAĜOJ DE LA MASTRUMADO SUR SENLIMIGITAJ KAMPOJ

En la tempo, kiam pli ol 2800 Unuecaj Terkulturaj Kooperativoj en nia lando decidis aŭtune meti finon al al malmoderna mastrumsistemo sur dissplititaj parceloj kaj per ekonomie-teknika adapto de la grundo transpasi al mastrumado sur senlimigitaj kampoj, certe interesas ĉiun et — kaj mezrangan terkulturiston, kiajn konkretajn rezultojn atingis tiuj UTK-oj, kiuj bone jam kolektis rikoltaĵon ne de dispecigitaj kampetoj, sed de grandaj, senlimigitaj terpecoj.

Por ke oni povu valortaksi la avantaĝojn de la nova formo de produktado, kian reprezentas la UTK-oj, mastrumantaj sur senlimigitaj grundoj, ni indikas la pohektarajn rikoltaĵojn de kelke da UTK-oj, atingitajn en la jaro 1949a, t. e. antaŭ la ekonomie-teknika adapto de la grundo, kaj en la jaro 1950 post la ekonomie-teknika adapto.

UTK en Vyškovice:

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1949 | 17 | 17 | 20 | 13 | 120 | 45 |
| 1950 | 20 | 19 | 28 | 18 | 150 | 70 |

UTK en Poběžovice:

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1949 | 14 | 16 | 12 | 10 | 40 | 115 |
| 1950 | 23 | 28 | 16,5 | 14 | 90—180 | 200 |

UTK en Volovčice:

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| 1949 | 16 | 14 | 17 | 15 | 90 | 30 |
| 1950 | 18 | 17 | 22 | 18 | 145 | 50 |

Ni konjektas, ke la diferencoj de la pohektaraj rikoltaĵoj, kiuj estiĝis per la ekonomie-teknika adapto de la grundo kaj per la transpaso al la nova mastrumsistemo, estas sufiĉe evidentaj por konvinki eĉ la plej konservativan terkulturiston, ke malnovmaniere oni ne povas vivi nek mastrumi ankaŭ en vilaĝo. Se la terkultura produktado kompensu sian malfruiĝon konsidere al la teknika ekipo kaj la moderna labor-organizo en aliaj fakoj de la produktado, ĝi devas en sia propra intereso kaj en la intereso de ĉiuj aktivaj terkuturistoj plene malfermi la pordon por la novepokaj progresaj metodoj, kiuj tiom bone elproviĝis en Sovet-Unio kaj kiuj ankaŭ en nia lando sekurigas por la vilaĝo ĉiujn eblojn de ekonomia, sociala kaj kultura pliprosperiĝo.

## URBO SUB SIGNO DE FAJRO

Tiu ĉi broŝuro de glora ĉs. verkistino, Nacia Artistino Marie Majerová estis en la traduko de Božena Vlčková, eldonita en 5.500 ekzempleroj. Ĝi havas 26 p., 15× 21,3 cm kaj kostas 30 Kĉs.

Eksterlandaj samideanoj apenaŭ povos ĝin havigi al si pro la internaciaj malfacilaĵoj aĉeti librojn eksterlande, sed ili povas ĝin ricevi de siaj ĉs. amikoj, kiel kontraŭvaloraĵon por aliaj esperantistaj libroj. Vi, kiuj regule legas nian Esperanto-Servon skribu al sia amiko en ĈSR aŭ al Esperanto-Servo, ke oni sendu ĝin al vi. La broŝuro mem estas bone tradukita kaj ĝi plenumos sian mision nur, se ĝi estos posedaĵo de ĉiu amanto de bela esperantista legaĵo. La aŭtorino mem pro sia sinteno al Esperanto meritas tion, ke ŝia verketo estu legata. Ŝi diras: *„La artefarita lingvo Esperanto ne estas ja la sola internacia komprenilo. Sed ĝi servas kiel tia al certa parto de ĉiu nacio kaj sekve helpas en paca celado. Tial mi ŝatas tradukon de mia verko en tiun ĉi lingvon.“*

## ĈEĤOSLOVAKIO, LANDO DE NATURBELAĴOJ KAJ SANIGAJ FONTOJ

*Ĉeĥoslovakaj esperantistoj* vigle korespondas kun eksterlandaj samideanoj; ili multfoje sendis al la legantoj de Esperanto-Servo dufolian poŝtkarton kun bela mapeto de Ĉeĥoslovaka Respubliko. Per tiu ĉi artikolo ni volas vin pli detale informi pri Ĉeĥoslovakio. Ĉeĥoslovakio estas kontinua geologia teritorio, diferencanta de la ĉirkaŭaj teritorioj per la konsisto de la tero kaj per la tavolaĵa karaktero. Tiun ĉi teritorion, loĝatan de ĉeĥoj kaj slovakoj, formas tri partoj: la Bohemia masivo, la okcidentkarpata arko kaj la subkarpata erupta regiono.

La bohemia masivo posedas karakteron de „montarfortikaĵo“, kies limon formas la limmontaroj: Šumava (= „Arbarmontaro“), Český les (= „Bohema Arbaro“), Krušné hory (= „Ercmontaro“), Lužické hory (= „Luzacia Montaro“) kaj Jizerské hory (= „Izer-Montaro“), Krkonoše (= „Gigant-Montaro“), kaj Orlické hory (= „Aglorivera Montaro“). La okcidentkarpata arko kaj la subkarpata erupta regiono okupas la orientan parton de Ĉeĥoslovakio. La nordan limdorson de la karpata arko formas la Beskidoj, Liptovské hole (= „la Kalvaj Montoj de Liptov“), la Alta Tatra-Montaro kaj Karpaty poloninské (= „Paŝtej-Karpatoj“).

Ĉeĥoslovakio estas la *fonta kaj akvodisiga teritorio* de la plej gravaj mezeŭropaj riveroj. Ĝi estas formata de naŭ kolektbasenoj, kiuj estas dividita en ĉarmajn valojn, kampojn, florplenajn ĝardenojn kaj herbejojn. Ĉiuj regionoj de Ĉeĥoslovakio estas multe vizitataj de turistoj pro la beleco de l' montoj, de kiuj oni facile transiras al pitoreskaj malaltaĵoj. Kelkajn montarregionojn (la Altan kaj la Malaltan Tatra-Montaron) tamen ŝatas ankaŭ la grimpuloj; troviĝas tie ĉiuspeca komforto por tranoktado.

La naŭ menciitaj kolektbasenoj estas la jenaj: 1) tiu de la supra parto de Ohře (Egro), 2) tiu de Vultavo kaj Elbo, 3) tiu de Lužická Nisa (= Luzacia Niso), 4) tiu de Morava kaj Dyje, 5) tiu de la supraj partoj de Odro kaj Vistulo, 6) tiu de Váh, Nitra, Hron kaj Ipel, 7) tiu de Slaná kaj Hernad, 8) tiu de la supra parto de Poprad, kaj 9) tiu de Bodrog. En Ĉeĥoslovakio frontas Elbo, Odro, Vistulo kaj alfluaj riveroj de Danubo

*Kavernoj*. La plej grandaj kaj plej belaj kavernoj troviĝas en la orienta parto de Ĉeĥoslovakio: la glacigroto Dobšiná (apud Spišská Nová Ves), la kalkŝtonaj kavernoj Demänová (en la Malalta Tatra-Montaro), Domica (apud Rožňava), la kavernoj de Belá, tiu de Važec kaj tiu de Bystrá (sub Tatra-Montaro). En Moravio troviĝas la mondofama abismo Macocha (profunda 136,5 metrojn), estiĝinta per falruiniĝo de la plafono de kaverno trafluata de la eta rivero Punkva, kaj la kaverna labirinto de Sloup. En Bohemio troviĝas la malgrandaj kavernoj de S-ta Prokopio en Hlubočepy apud Prago, la Barrande-kaverno en Srbsko kaj la kaverno „Juvelejo de Krakonoš“ en Obří důl (= „Kavo de Gigantoj“) en la Gigant-Montaro.

*Lagoj*. La plej granda lago de Ĉeĥoslovakio estas tiu de Mácha (350 ha), portanta la nomon de la glora ĉeĥa poeto Karel Hynek Mácha; en Doksy apud la Mácha-Lago oni elkonstruis en belega medio internacian esperantistan somerrestadejon. Inter la pluaj eminentas la Štrba-Lago en la Alta Tatra-Montaro kaj Čertovo jezero (= „Lago de Diablo“) en Šumava.

*Fiŝlagetoj, fiŝkaptado*. La plej granda el la fiŝlagoj de Ĉeĥoslovakio, famaj pro karpobredado, estas tiu de Rožmberk (7920,97 ha) apud Třeboň kaj Bezdrev (520,4 ha) apud Hluboká. — En la montaraj riveretoj, la alfluaj riveroj de Elbo kaj Vultavo kaj en la slovakiaj riveroj kaj riveretoj oni praktikas viglan fiŝkaptadon (trutoj, timaloj, en la akvoj de Slovakio ankaŭ hukoj kaj siluroj).

*Banlokoj*. En la geologia formacio de Ĉeĥoslovakio estiĝis multaj mineralakvaj fontoj, el kiuj pluraj akiris pro sia specialeco tutmondan famon.

La plej konataj banlokoj de Ĉeĥoslovakio estas:

*Karlovy Vary*. Indikoj: malsanoj de asimilado (artrito, diabeto, korpulenteco), ventro- kaj intestkataroj, galŝtonetoj, inflamoj de galveziko, iktero, hepatmalsanoj, malsanoj de urinveziko.

*Mariánské Lázně*. Indikoj: kor- kaj renmalsanoj, artrito, arteriosklerozo, konstipo, korpulenteco, malbona digestado.

*Františkovy Lázně*. Indikoj: kormalsanoj, malsanoj de la mova aparato, artik-afekcioj, nervinflamoj, malsanoj de asimilado.

*Jáchymov*. Indikoj: sangmalsanoj, artrito, neŭralgio, haŭtafekcioj, postoperacia kuracado de pereigaj tumoroj.

*Teplice Lázně*. Indikoj: longedaŭra reŭmatismo, artrito, longedaŭraj eksudoj, ankilozoj, longedaŭraj kataroj de urinveziko.

*Poděbrady*. Indikoj: kormalsanoj.

*Luhačovice*. Indikoj: kataroj de la digesta aparato, tiuj de la spirorganoj, kordifektoj, malsanoj de asimilado.

*Štrbské pleso* (= Štrba-Lago). Indikoj: nervomalsanoj, la Basedow-malsano, anemio, pulmokataroj, neŭrastenio.

*Smokovec*. Indikoj: malsanoj de la spirorganoj, la Basedow-malsano.

*Sliač*. Indikoj: kormalsanoj, virinaj malsanoj, nervomalsanoj, medol-atrofio.

*Piešťany*. Indikoj: reŭmatismo, artik-afekcioj, artrito, neŭralgio.

*Trenčianske Teplice*. Indikoj: reŭmatismo, artik-afekcioj, artrito, neŭralgio.

*Ecoj de la grundo, vegetaĵaro*. La plej fekundaj regionoj de Ĉeĥoslovakio estas la ebenoj ĉe Elbo, la moraviaj kaldronvaloj kaj la Danub-ebeno.

Koncerne la vegetaĵaron, Ĉeĥoslovakion formas du karakterizaj regionoj, la okcidenta kaj la orienta, kiuj akre diferencas de la vegetaĵaj teritorioj de la najbaraj ŝtatoj kaj superas ilin per riĉeco kaj diverseco de la vegetaĵaj formacioj.

Triono de la ĉeĥoslovakia grundo estas kovrita de arbaroj. La arbara kovraĵo estas precipe disvolvita en la limteritorioj. En subaj pozicioj havas superecon foliarbaroj, la montaraj arbaroj estas plejparte koniferaj. En Beskidoj, en Slovakia Ercmontaro kaj en Šumava (Boubín) konserviĝis ankoraŭ restoj de praarbaroj.

La *vinberkulturado* estas disvolvita precipe en Slovakio sur la deklivoj de la Malgrandaj Karpatoj, apud Pezinok, Modra kaj en la ĉirkaŭaĵo de Bratislava. En Moravio oni kulturas vitojn en la ĉirkaŭaĵo de Mikulov, Bzenec kaj Uherské Hradiště. En Bohemio troviĝas famaj vinberejoj ĉirkaŭ Mělník kaj Žernoseky.

La *ekonomia sistemo* de Ĉeĥoslovaka Respubliko estas bazita sur alnaciigo de la mineralriĉaĵoj, industrio, grandkomerco kaj bankoj. La grundo apartenas al tiuj, kiuj senpere kulturas ĝin. Eta kaj mezgranda entreprenado estas leĝe protektata. La alnaciigita parto de la produktado sumiĝas je 70%, la privata je 30%. La energifontoj kaj -entreprenoj, minejoj, metalfandejoj, mineralakvaj fontoj, entreprenoj kun pli ol 50 okupatoj, bankoj, asekurejoj, la fervoj-, aer- kaj ŝosetrafiko, la poŝto, telegrafo, telefono, radiofonio kaj televizio, kinematografio estas nacia posedaĵo.

Ĉe la unua bienreformo en la jaro 1945a oni distribuis 1,300 000 hektarojn da grundo al 150.000 familioj. La dua bienreformo el la jaro 1948a disdividas grandbienulan grundon, se tiu superas 50 hektarojn.

La kooperado estas koncentrigita en Centra Konsilataro de Kooperativoj. La tuta nacia ekonomio en Ĉeĥoslovaka Respubliko servas la popolon. La ŝtato direktas la ekonomian agadon per unueca ekonomia plano. La celo de la Dujar-Plano (1947—1948) estis la renoviĝo kaj rekonstruo de la ĉeĥoslovaka ekonomio; la Kvinjar-Plano (1949—1953) havas kiel taskon la konstruadon de socialismo. La realiĝo de la Kvinjar-Plano ne estus imagebla, se ne estus okazinta la glora Februaro 1948, kiu vanigis la klopodojn de la en- kaj eksterlanda reakciularo.

---

Ĉiujn dezirojn kaj proponojn bonvolu adresi al: „Esperanto-Servo“, Praha II, Malá Štěpánská 7, Ĉeĥoslovakio, telef.: 330-14. Eldonas: Instituto de Esperanto-Servo-Praha. Responda reprezentanto de Esperanto-Servo: A. Malík. Presis: St. tisk., nár. p., z. z. 01. Praha, Ĉeĥoslovakio.